

Brazila Esperantisto

646-648

Jan. / Mar.
1968

62-a jaro

MALBA TAHAN EN CAMPOS

DIPLOMOJ – RECENZO – STATISTIKO



Parto de Placo República, kie situacias Brazila Esperanto-Ligo (p. 2).

Anúncio

Livros de Aprendizado:

	NCr\$
Curso de Esperanto em 20 lições	2,00
Método Elementar de Esperanto	2,50
Primeiro Manual de Esperanto	1,70
Esperanto Sem Mestre (necessário ao curso superior)	9,00
Privilegia Vojo (método direto, ilustrado)	3,50

Livros de Leitura:

	NCr\$
Fundamenta Krestomatio	14,70
Esperanta Legolibro (Migliorini)	3,50
Universala Legolibro (Fricke)	2,80

Dicionários:

	NCr\$
Plena Vortaro de Esperanto	14,00
Dicionário Esperanto-Português	2,50

Teatro:

	NCr\$
Teatro de Machado de Assis (quatro comédias em Esperanto)	2 00
Amor por Anexins, Arthur Azevedo. Texto em português e em Esperanto. No mesmo volume prover-correspondentes nas duas linguas classificadas por assunto	2,50

Nia kovrilo:

Fotografajo de parto de karto de la urbocentro de Rio de Janeiro. Tute desegnita de Prof. L.P. de Miranda Ribeiro, la karto (103 cm x 0,73 cm) montras la ĉefajn konstruaĵojn kaj monumentojn en la centro de la urbo. La stelo indikas la situacion de la sidejo de Brazila Esperanto-Ligo inter la stratoj Constituição kaj Buenos Aires.

Januaro-Marto 1968

62-a Jaro

N.º 646-648

BRAZILA ESPERANTISTO

("O Esperantista Brasileiro")

Oficiala organo de

BRAZILA ESPERANTO-LIGO

Societo de publika utileco, laŭ registara

dekreto N. 4356, 26 Oktobro 1921

Direktoro:

A. CAETANO COUTINHO

Respondeca redaktoro (redactor principal):

D-ro CARLOS DOMINGUES

Administracio kaj Redakcio:

Praça da República, 54, 2.º

Telefone: 42-4357

Sidejo de la Brazila Societo de Geografio

RIO DE JANEIRO — BRAZIL

Senpaga por anoj de **B. E. L.**

Eksterlande: 18 steloj aŭ 15

respondkuponoj

QUOTA ANUAL DE ADESAO A LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO 1968

(De acordo com os Estatutos todos os membros são automaticamente filiados à organização mundial)

Membro simples: recebe a carteira de sócio, os cupões de serviço e o "Brazila Esperantisto"	8,00
Membro com direito ao Anuário: recebe o mesmo que o antecedente e mais o Anuário do movimento esperantista	25,00
Membro Assinante: recebe o mesmo que o antecedente e mais a revista "Esperanto"	35,00
Membro Mantenedor: recebe o mesmo que o Membro Assinante	60,00
Patrão: recebe o mesmo que o Membro Assinante e paga 10 vezes a quota deste.	
Membro Vitalício: recebe o mesmo que o Membro Assinante e paga 20 vezes a quota deste.	

Tôdas as importâncias devem ser remetidas em cheque pagável no Rio de Janeiro à

**LIGA BRASILEIRA DE
ESPERANTO**

**PRAÇA DA REPÚBLICA, 54, 2.º
Rio de Janeiro, GB**

Idioma Comum

Erlindo Salzano

Uma língua servirá de intermediária comum do pensamento, sem *capitis diminutio* para nenhum povo, porque será uma língua neutra. A humanidade já a preparou. Ela foi submetida com êxito a todas as provas. É flexível, sensível e traduz com fidelidade e detalhes qualquer idéia. Vem resistindo galhardamente ao tempo, ampliando sempre mais o número dos que a cultivam: é o *Esperanto*, denominado, muito justamente por Emile Boirac, da Universidade de Dijon, o “Latim da Democracia”. Quando se pensa que a Academia Francesa arrolou no globo a existência de 2.796 línguas, com aproximadamente 120, pelo menos de importância prática e literária, compreende-se o valor que teria para um mundo que caminha para união, a adoção de uma língua comum de entendimento. Na Oceania, por influência predominante dos chineses, gerou-se espontaneamente um idioma

geral, o *pidgin*, corruptela do inglês, que serve de intermediário para os nativos entre si e dêles para os brancos. O uso dessa “admirável confusão”, a que Jack London chamou de “língua sem gramática, nem dicionário”, tem-se difundido a quase todas as Ilhas do Pacífico sul, como solução natural para uma necessidade criada pelo intercâmbio entre homens de vida primitiva. Se selvagens estão resolvendo assim o seu problema, como admitir que civilizados já não tenham dado a êle maior atenção? Como compreender que a ONU não tenha já, com a preferência de uma língua neutra abolido as línguas oficiais que foi obrigada a adotar e que acarretam tantos inconvenientes e despesas? Já não será tempo de dar maior atenção a tão transcendental problema, mormente quando o instrumento ideal, pronto e acabado apenas está a espera de que os homens o aproveitem?

O Dr. Erlindo Salzano, ilustre médico em São Paulo e ex-Vice-Governador do Estado é membro vitalício do movimento esperantista. Recentemente publicou êle a importante obra *Caminhos Novos em Velhos Rumos* (Livraria Martins Editôra), que em dez magistrais capítulos trata de temas de grande

valor e actualidade, tais como: O Macrocosmo — o Universo, O Microcosmo — o Homem, Evolução Econômico-Social, Democracia Genuína o Subdesenvolvimento, a Revolução Mundial, a Revolução Brasileira.

A rica bibliografia da obra revela a notável cultura do autor; é interessante notar que entre as obras citadas figura *Jarmiloj Pasas* Hermann Haefker, valiosa síntese de História Universal em Esperanto. Do capítulo "A Revolução Mundial" extraímos o conceituoso artigo com que abrimos este número do *Brazila Esperantisto*.

Vizito de Malba Tahan al Campos

De la 14-a ĝis la 18-a de Novembro lasta, je invito de Campos Esperanto-Klubo vizitis la urbon Campos la fama verkisto Malba Tahan, plumnomo de Prof. Júlio César de Mello e Sousa. Kiel oficiala gasto de la urbo, Malba Tahan estis akceptita de la urbestro S-ro José Carlos Vieira, en la Komunuma Konsilantaro kaj en multaj aliaj elstaraj institucioj.

Campos Esperanto-Klubo organizis la programon de la vizito de Malba Tahan kaj ĝia ĉefa parto estis diplomiga festo de la unua Esperanto-kurso en la urbo.

La disdono de la diplomoj okazis en la 15-a de Novembro, je la 8-a vespere, en la sidejo de Atleta Asocio de Banco do Brasil, sub la direkto de S-ro Silvio Navega Dias, Prezidanto de Campos Esperanto-Klubo, kiu invitis al la tablo S-ron Prata Tavares, ĵurnalisto, gazetarad-junkto kaj oficiala reprezentanto de la urbestro, D-ron Godofredo Tinoco, verkisto, kaj Prezidanto de Beletristika Akademio de Campos, S-rojn Vivaldo Marcelino da Silva kaj Jarbas da Silva Banco, respektive Instrudirektoro kaj Sociala Direktoro de la klubo.

En la nomo de klubo salutis la vizitanton S-ino Evany Tavares Medina, kompetenta pianistino kaj reĝisorino de la horo de la klubo, kiu plezurigis la ĉeestantojn per kanzonoj en Esperanto.

Poste Malba Tahan faris brilan paroladon pri la temo *Esperanto, kiel internacia lingvo*.

La soleno finiĝis per la prezentado de la filmo *Renkonto kun Fiat*, donacita de la granda itala aŭtomobila fabriko.



Malba Tahan en la festo de Campos Esperanto-Klubo

Vizitoj

Dum la kvintaga restado en Campos Malba Tahan kaj edzino vizitis plurajn lokajn intituojn, kie ili ĉiam atestis la gastamon de la urbanoj.

Estas menciinde la akcepto de D-ro Ewerton Paes da Cunha, kuracisto, membro de la Beletristika Akademio de Cam-

pos, direktoro de la Liceo de Campos kaj la vizito al la ĵurnalo *Monitor Campista*, la tria plej antikva de Brazilo; al la Fakultato de Medicino ĵus inaŭgurita; al Kolegio kaj Normala Lernejo Nia Sinjorino Helpantino; al la Federacia Teknika Lernejo, kies direktoro, D-ro Renato Marion Aquino, estas ekslernanto de Prof. J. C. Mello e Sousa; kaj al Sukerfabriko São João.

Brazila Kroniko

Pará

Belém — Gazetoj de la ĉefurbo de Stato Pará informas pri la kurso de Esperanto, okazinta en la loka Federacia Universitato, en Aprilo 1967, sub gvido de S-roj Euclides Caripuna Soares kaj José Ribamar Leite de Azevedo. Tio estas plia fakto pruvanta la intensiĝon de la esperanta movado en universitatoj kaj oficialaj lernejoj en Brazilo.

Piauí

Curimatá — S-ro Samuel Dourado Guerra, instruisto en la urba Instituto de Edukado, komunikis, ke li rekomencas la instruadon de la Internacia Lingvo en sia bieno *Esperanto*, proksime de Curimatá. Esperantistoj, kiuj eble disponas pri propaganda materialo, lernolibroj aŭ gazetoj, bonvolu helpi la novan lernejon.

Rio Grande do Norte

Natal — Sub aŭspicioj de Associação Potiguar de Esperanto komenciĝis en lasta Aprilo nova serio da lecionoj en ĝia jam tradicia kurso de Esperanto. La inaŭgura kunveno okazis en la sidejo de *Academia Norte-Riograndense de Letras* kun multenombraj ĉeestantoj, inter kiuj troviĝis la prezidanto de la ŝtata Beletristika Akademio kaj eminentuloj de nia movado en Rio Grande do Norte.

Bahia

Muritiba — Fondiĝis en tiu urbo Instituto *Muritibano de Esperanto*, kun jena estraro: Prez.: Anarolino Barbosa Alves, Vic-Prez.: Reginaldo Fragoso Cerqueira, Gen. Sekr.: Manoel Bor-

ges dos Santos, Sekretarioj: Nilza Santa Rita da Silva kaj Delizette Castro e Silva; Kasistoj: Samuel Ferreira kaj D-ro. Carlos Amorim Filho. La ĵus fondita societo jam energie eklaboras por subteni la diversajn kursojn de Esperanto nun funkciantajn en Muritiba.

Rio de Janeiro

Resende — S-ino Augusta B. de Souza venkis konkurson de tradukado faritan per iniciato de Brazila Klubo "Esperanto" el Guanabara. Ŝi estas aktiva membro de la esperantista klubo de Resende.

São Paulo

Ribeirão Preto — Nia samideano José Pedro Miranda prelegis pri Esperanto en Gimnazio Pestalozzi de la najbara urbo Franca, kaj ankaŭ en Bento Quirino. Per tiu tre efika servo de informado, Ribeirão Preto Esperanto-Klubo sendube acelos la disvastigon de Esperanto en la floranta internlando de ŝtato São Paulo.

São José dos Campos — Jen la nova estraro de Verda Stelo Esperanta Societo: Prez.: Miguel Rodrigues, Vic-Prez.: Francisca R. P. Faria, Gen. Sekr.: Alcyr Guedes de Almeida, Unua Sekretario: Euripedes Silva, Kasisto: Geraldo Mesquita Soares. La konsilantoj estas: Mário Arantes, Alan Kardek Lima kaj Hebe Faria.

Paraibuna — S-ino Erika Lins gvidis kurson de Esperanto en la Gimnazio de Paraibuna, fine de la pasinta jaro.

Santa Catarina

Tubarão — La studenta kultura societo *Grucal*, dezirante fondi sektion de studoj pri la Internacia Lingvo, skribis al B.E.L. kaj petis informojn pri Espe-

ranto. Ĝia adreso estas: Caixa Postal 199, Tubarão, Santa Catarina.

Goιάs

Alto Paraíso — El la bieno-edukejo *Bona Espero* venas la sciigo, ke la grupo da infanoj, tie lernantaj Esperanton, jam komencas parole uzi la lingvon, kaj, post kelka tempo, la plej progresintaj enskribiĝos por ekzameno ĉe B.E.L. Per sia senlaca laboro en tiu kampo, S-ro Benecito Lopes kaj liaj helpantoj kredeble formos, en proksima estonteco, rimarkindan esperantistan kolonion en Alto Paraíso.

Goiania — En Gimnazio *Emanuel da Irradiação Espirita Cristã*, sub direktado de S-ino Sílvia Alessandro Monteiro de Castro, oni komencis, la unuan de Marto pasinta, regulan kurson de la Internacia Lingvo, kun tri niveloj, nome: elementa, meza kaj supera. Ĝi ampleksas la 4 klasojn de la gimnazio kaj do havas multe pli vastan programon ol la normalaj kursoj de Esperanto. Unu el la instruistoj estas S-ro José Expedito Castel.

III Nacia Kunveno de Radiamatoroj

En la III Nacia Kunveno de Radiamatoroj, okazinta de la 10-a ĝis la 17-a de Decembro lasta en Brasília, estis aprobita tezo de instruado kaj uzado de Esperanto inter la Radiamatoroj.

La tezo unuanime aprobita estas proponita de S-ro Luiz Bolívar Fosca (PY 2 BF) el la urbo São Paulo, kaj ricevis la trian premion. La raportanto estis D-ro Raymundo Nonato de Castro, ĵugisto en Manaus.

La aprobo de tiu tezo estas signifoplena, ĉar la radiamatoroj pli ol iuj ajn taksas la valoron de internacia lingvo en internacia interkomunikigado.

Nekrologo

Moacir Malheiros Fernandes e Silva

En Rio de Janeiro mortis en la 30-a de Septembro lasta Ing. Moacir Malheiros Fernandes e Silva ano de Brazilia Esperanto-Ligo kaj de Brazilia Klubo

“Esperanto”. Li estis teknika konsilanto de Ministerio de Trafiko kaj Publikaj Laboroj, vicprezidanto de Brazilia Instituto de Geografio kaj Statistiko kaj ties anstataŭanta Prezidanto. En I.B.G.E. li lernis Esperanton en kurso tenata de B.K.E. kaj ricevis diplomon. Kun sia familio li partoprenis kaj kunlaboris en kunveno de B.K.E. Brazilia Esperanto-Ligo komisiis al li la faradon de resuma Geografio de Brazilo, kiun bedaŭrinde li ne povis finverki.

Ni kondolencas la familion.

Paulino Santiago

La morto de Paulino Santiago estis grava bato por nia Movado. Fariginte esperantisto jam en 1907 li fidele kaj konstante laboris por nia afero en sia urbo kaj ŝtato dum 50 jaroj. Li naskiĝis en Maceió en 1888 kaj mortis en la sama urbo en la 10-a de Oktobro 1967.

Komencinte lerni nian lingvon tute sole kiel oficisto de librovendejo li sukcesis bone regi ĝin kaj tiel la Brazilia Kongreso de Esperanto en 1912 donis al li la diplomon de Profesoro Aprobita. En 1922 li estis nomita por plenumi la delegitecon de al Esperanto-Movado kaj li estis do la plej malnova delegito en Brazilo. Jam maljuna li partoprenis nian kongreson en Salvador (1959) kun mirinda entuziasmo.

Verkisto, poeto, membro de la Literatura Akademio kaj de la Historia Instituto de Alagoas li ĝuis altan konsideron ĉe kulturaj medioj.

En siaj Esperantaj aktivecoj li fondis kun Arruda Beltrão en 1910 Alagoas Esperastan Klubon, iom poste la Verdestelanojn, en 1947 “Centro Esperantista Couto Fenandes” kaj en 1955 novan esperantistan grupon; li faris plurajn kursojn, prelegojn ankaŭ per radio; kaj verkis multajn artikolojn por la lokaj gazetoj. Resume, Paulino Santiago gajnis por Esperanto la ĝeneralan simpation.

B.E.L. renovigas al la familio la kondolecon prezentitan okaze de la forpaso de nia kara samideano kaj amiko.

Anoncetoj

* Por preparo de verko serĉas kontakton kun personoj, kiuj interesiĝas pri la temo *Milito kaj Paco en la Mondliteraturo* S-ro L. Van Den Briele, Postbus 673, Brussel 1, Belgujo.

* Dez. kor. kun instruistoj pri lingva instruado S-ro Fusacugu Kido, Higasi

Mukojima 3-16-4, Sumida, Tokio, Japanujo.

* Dez. kor. F-no Emiko Kawaguti, Nisi Sugamo 4-280, Tosima, Tokio, Japanujo.

* Biblia Koresponda Kurso *La Navigantoj* kaj diversaj aliaj evangeliaj eldonaĵoj estas senkoste haveblaj ĉe Esperanto-Misio, Sveda sekcio de K.E.L.I., Box 7, S-690 51 Ostansjö, Svedujo.

Esperanto no estrangeiro

Dinamarca — Com a morte de Ferenc Szilágyi, fundador e redator de *Norda Prismo*, a revista passou a ser redigida por William Auld. O redator-secretário continua sendo o Sr. M. Groth, que tem seu expediente em Bröndbyöster torv 6, Hvidovre, Dinamarca.

França — Com excelentes fotografias em exuberante colorido e quase nenhum texto além das legendas, acaba de ser editado prospecto de Vichy, a grande cidade termal francesa. O prospecto foi publicado em colaboração com o *Escritório de Turismo e Termas e a Prefeitura de Vichy*, 17 rue Daunou, Paris 2e.

Inglaterra — Em novo formato, e também em nova série, está circulando o número 5 (primeiro trimestre de 1968) de *Gepatra Bulteno*, edição e redação do Sr. Derrick Faux. A revistinha se propõe — e vem fazendo com sucesso — estabelecer um elo entre os pais esperantistas, orientando-os, por vezes, na educação dos filhos com relação ao Esperanto. Seu redator, Sr. Faux, criou um serviço de correspondência pelo sistema de gravações de fita que visa maior aproximação entre as famílias. Interessados podem escrever para *Gepatra Bulteno*, 4 Brunswick Square, Gloucester, Inglaterra.

Polônia — Num estúdio cinematográfico de Wrocław, na Polônia, estabeleceu-se um núcleo da *Associação Esperantista da Polônia*, com adesão de artistas e técnicos do estúdio, e com o apoio do seu diretor, Sr. G. Nowak. Endereço: Pola Esperanto-Asocio, Núcleo do Estúdio de Belartaj Filmoj, str. Wystawowa, Nr. 1, Wrocław, Polônia.

Aperfeiçoe o seu Conhecimento

La leono kaj la muso

Monteiro Lobato

Elirinte el sia kavo, iu muso trovis sin inter la manoj de la leono. Li ekhaltis, kun la haroj hirtiĝintaj kaj paraliziĝis de la timego. La leono tamen faris al li nenium malbonon. "Iru en paco, muso; ne timu vian reĝon." Post kelkaj tagoj la leono falas en rektaptilon. Li hurlas afliktege, skuigas, tordiĝas, kaj, ju pli li agitiĝas, des pli li sentas sin ligita de la kaptilo. Altirita de la bruo venas la muso. "Servo postulas rezervon", li diras al si; kaj ekmordas la ŝnurojn. Li mordas kaj mordas tutajn horojn, kaj tiom da penoj li faras, ke li sukcesas rompi unu el la maŝoj. Kaj ĉar la reto estis tia, ke ĉe la rompigo de la unua maŝo, la ceteraj malstreciĝas, la leono povis liberiĝi kaj forkuri. *Pli valoras pacienco de malgrandulo ol puŝegoj de leono.*

Ujrapuruo kaj Esperanto

*Amiko, haltu! Lacaj estas ni!
En ĉi arbaro estas nestoj, amoj...
Kaj al ni ŝajnas pli proksima Di!
Sin kovras la branĉaro per ornamoj.
La birdoj flugas, pepas kun plezur';
Per floroj mil, parfumoj kaj koloroj.
Jen vestas sin, koketas la Natur'.
En ĉio estas ĝojo pro la koroj!*

*La kantobirdoj lerte provas ion!...
Amik', aŭskultu ĉi muzikon belan!
Gaje kantante tian melodion.
Ili salutas ĉiun tagon helan.
La melodio ĉesis! Nova kant'
Sin levas en aeron kaj sentigas
La plej profundajn vibrojn de l' revant'...
Kaj eĉ aliajn birdojn silentigas!*

*Ujrapuru', kantisto de l' arbar',
Amata de la tuta birda rond'
Tre, tre amata ankaŭ de l' Homar',
Jen Esperanto — Lingvo de la mond'!*

G. Goes

Ujrapuruo, brazila birdeto. Laŭ legendo dum ĝia kantado la aliaj birdoj silentas.

(1)

Originaloj de D-ro Zamenhof

Henerik Kocher

La tekstoj de D-ro Zamenhof, originalaj aŭ tradukitaj, estas eksterordinare valoraj, laŭ historia kaj lingva vidpunkto. Kun la apero de la kvara volumo de la Fabeloj de Andersen, liaj tradukoj estas plene eldonitaj; ni atendas nur la eventualan publikigon de la Zamenhofaj manuskriptoj de la Biblio ne eldonitaj de Hachette. La originalojn kolektis D-ro Dietterle, en la monumentan Originala Verkaro⁽¹⁾, kaj Prof. Waringhien, en la du volumojn de Leteroj⁽²⁾.

Malgraŭ la grandnom-

braj kopi- kaj presaroj ekzistantaj en la Originala Verkaro — cetere facile korekteblaj laŭ la listoj publikigitaj de *The British Esperantist*⁽³⁾ kaj en *La Revuo Orienta*⁽⁴⁾ — kaj malgraŭ tio, ke Prof. Waringhien verkis la enkondukon kaj la komentariojn en ia stranga dialekto tiuj tri volumoj estas tre utilaj, kaj iliaj redaktintoj meritas laŭdon kaj dankon por la servo, kun ili faris. Tamen tiuj kolektoj kompreneble ne estas kompletaj, aŭ ĉar la posedantoj de la originaloj ne liveris ilin al

la kolektintoj, aŭ ĉar la tekstoj estas presitaj en malfacile troveblaj gazetoj, aŭ ĉar la kolektintoj ne opiniis ilin valoraj por siaj kolektoj.

La fakto estas, ke la esperantistoj alte ŝatas la originalojn de D-ro Zamenhof, kaj certe la es-tontaj redaktantoj de tiaj kolektoj donos en li lokon eĉ al la ŝajne malplej valoraj originaloj de la Majstro. Jam nun la kolektado devas esti farata, kaj *The British Esperantist*, Heroldo de Esperanto kaj la revuo *Esperanto* donas al ni la ekzemplon. Imitante tiun ekzemplon, mi publikigas ĉi tie kelke da tekstoj. La du unuaj estas poŝtkartoj adresitaj al nia pioniro S-ro A. Caetano Coutinho tiam loĝanta en Sete Lagoas. Minas Gerais; la ceteraj estas ĉerpitaj el tre malnovaj gazetoj, kiujn nur malmultaj personoj havas okazon esplori.

N- roj 1 kaj 2⁽⁵⁾

Poŝtkartoj al S-ro A. Caetano Coutinho

12/24 IX 1898

Kara Sinjoro!

La librojn mi sendis al Vi hieraŭ. Por traduki la "Ekzercaron" en lingvon portugalan mi kun plezuro donas al Vi mian plenan permeson. En la "Biblioteko" Via traduko ne povas esti presita. Vi devus ĝin presi en formo de aparta broŝuro.

Via L. Zamenhof

9/21-V-99

Kara Sinjoro!

La librojn mi sendis al Vi. La verkojn N.º 46 kaj 51 mi jam pli ne havas; ĉu Vi ne deziras ricevi ion alian anstataŭ ili?

Kun granda plezuro mi vidas, ke nia afero trovas en Vi energian laboranton kaj mi deziras al Via laborado plej bonan sukceson.

Kun kora saluto

Via L. Zamenhof

N-ro 3

Letero presita en American Esperanto Journal kaj represita en The British Esperantist, 1908 pg 35

Kara Sinjoro,

Mi respondos mallonge viajn demandojn kiom mi povas.

1. Mi havas tri infanojn
2. Iliaj nomoj kaj aĝoj: Adamo (nask. 1888), Sofio (1889), Lidio (1903). La du lastaj estas knabinoj.
3. Mi naskigis la 15an de Decembro, 1859. Mian altecon kaj pezon mi ne scias. (Mi estas malalta kaj nepeza.)
4. Familia nomo de mia edzino: Silberniki.
5. Mia bopatro helpis min.
6. Mi kuracas nur malsanojn de okuloj.
7. Mi opinias, ke mi neniam vizitos Usonon, ĉar mi sentas min ne kapabla por granda mara vojaĝo; ke Esperanta

Kongreso tie iam estos, mi kredas certe.

8. Usono tre plaĉas al mi, ĉar ĝi apartenas ne al tiu aŭ alia gento, sed al ĉiuj homoj kiuj loĝas kaj honeste laboras en ĝi. Mi kredas profunde, ke Usono estas la tipo de ĉiuj estontaj regnoj kaj landoj.

9. La plej granda parto de mia paren caro ne scias Esperanton.

10. Mi tre amas poezion kaj muzikon; sed bedaŭrinde la tro okupata tempo tute ne permesas al mi ĝui ilin. Mian fotografajon mi nun ne havas.

Via,
Zamenhof

N-ro 4

Letero presita en la Rumena Gazeto Esperantista, Aprilo 1908

Varsovio, 16-an de Marto 1908

Karaj Sinjoroj

Kun plezuro kaj danko mi ricevis la unuan numeron de la "Rumena Gazeto Esperantista". Al la Unua Rumena Societo Esperantista mi sendas mian koran gratulon pro la energia kaj grava paŝo kiun ĝi faras, al la nova gazeto mi deziras la plej bonan sukceson. Mi esperas, ke la apero de Via gazeto estos epokfaranta por nia afero en Via lando, kiu ĝis nun preskaŭ tute ne partoprenis en nia movado, sed kiu baldaŭ, espereble, okupos tre gravan lokon en la movado Esperantista.

Via
ss. Dro L. Zamenhof

(1) L. L. Zamenhof. ORIGINALA VERKARO. Antaŭparoloj, Gazetartikoloj, Traktaĵoj, Paroladoj, Leteroj, Poemoj Kolektitaj kaj Ordigitaj de D-ro Joh. Detterle, 605 paĝoj. Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig, 1929.

(2) LETEROJ DE L. L. ZAMENHOF. La Tragedio de lia Vivo Rivelita de lia ĵus Retrovita Korespondo kun la Francaj Eminentuloj. Prezentado kaj Komentado de Prof. G. Waringhien. 2 volumoj, 369-375 paĝoj. S.A.T., Paris. 1948.


(3) Kolekto de la jaro 1957, paĝo 107.

(4) Kolekto de la jaro 1937 numeroj de Marto (pĝ 107/110); Aprilo (pĝ 161/163), Septembro (pĝ 343/346) kaj Oktobro (pĝ 362/367).

(5) Ambaŭ poŝtkartojn S-ro Ismael G. Braga presis en sia krestomatio ESPERANTO-MODELO, pĝ 43; la originalon de la n-ro 2 mi posedas, ĝi estis al mi donacita de S-ro A. Caetano Coutinho.

MOSAIKO

Anekdoto



— Ne riproĉu min! Nur la kotsirmilo difektigis...

Kuirarto

Simpla Kuko. Ingrediencoj: 250 gramoj da butero, 3 tetasoj da sukero, 5 ovoĵ, 4 tetasoj da tritikfaruno, 1 glaso da lakto 1 supkulero da pudrofermentilo.

Preparmaniero: poste tute kirli la buteron, adiciu la sukeron, kaj ĉiam kirlante, la kvin ovoflavojn, alterne la tritikfarunon kaj la lakton, poste la fermentilon, fine la kvin ovoblankojn antaŭe ŝaŭmkirlitajn.

Verŝu la miksaĵon en butersmiritan formilon kaj kuiru ĝin en forno.

Kuriozaĵoj

— Antaŭ sesdek jaroj, en 1908, Coelho Neto fama bazila verkisto, donis al Rio de Janeiro la alnomon "Cidade Maravilhosa" (*Urbo Mirinda*), en artikolo publikigita en la ĵurnalo "A Notícia".

— Laŭ Alberto Montalvão en "Grandaj Eipensajoj kaj Malkovraĵoj" estis la brazila pastro João Fernandes de Azevedo la elpensinto de la skribmaŝino.

Lia elpensajo estis publike prezentita en 1861 en Nacia Ekspozicio okazinta en Rio de Janeiro, kaj premie li ricevis ormedalon.

Vizitante Brazilon, usonano havigis al si de pastro Azevedo la maŝinon. En Usono oni ekplibonigis ĝin kaj baldaŭ ĝia konstruado komenciĝis grandskale.

DIPLOMOJ-1967

Faris ekzamenon kaj ricevis diplomon jenaj esperantistoj:

NORMA ELEMENTA DIPLOMO

Brazila Klubo "Esperanto", Rio de Janeiro:

Macário Piastrella
Orlando Pereira da Silva
Ivo Accorsi
Ivo Pinto Magalhães
Wilse Gonçalves
Waldyr Duarte de Souza
Maria da Conceição Ribeiro

Ce Federação Espírita Brasileira pere de Brazila Klubo "Esperanto", Rio de Janeiro:

Eliseu Antônio da Frota
Suely David Caldeira
José Coelho de Barros
Palmyra Alves Pereira
Ranulfo Lopes Rios
Myriam Guimarães Santa Rita
Isnaty Paula Brasil

Ce Universidade do Ceará pere de Ceará Esperanto-Asocio, Fortaleza:

Gualter Gonçalves Lopes
Sebastião Medeiros
Jeovah Pinto Maia
José Francelino de Oliveira
Antônio Medeiros
Gessé Francisco de Almeida
José Bezerra de Menezes
Manoel Osvaldo Heleno Nazardo
José Gelso Bessa
Maria Vitória Furtado Lopes
Aluísio Maximiano dos Santos
José Ferreira
João Bosco Marques Feitosa
Myriam Gaspar Aquino de Souza
Alexandrino Santos de Oliveira
Francisco de Assis Caetano
Francisco César Campos Aires
Francisco Edilson Saraiva Freire
Maria Ivanilda Araújo Leite

Bahia Esperanto-Asocio, Salvador:

Floriana Passos de Oliveira
Leonice da Silva Almeida

Pere de Clube Esperantista Juiz de Fora, Santos Dumont MG:

Acyr Loureiro Lima
Hilton Silva
Idésio Fernandes
Jairo Nilton Pinto de Souza
Maria das Graças Fernandes Barreto
Maria Rachel de Assis Castro
Nesir Meurer Coimbra Alves
Sidney Maria Gomes
Suely Maria das Graças Gomes
Waldete Ottoni da Costa

Uberlândia Esperanto-Klubo, Uberlândia MG:

Jair Corrêa Loureiro
Carlos Alberto Jorge
Terezinha Maria Moreira
Maura Gomes
Dinah Fernandes de Carvalho
Luiz Alberto Andrade Arantes
Maria José Bayão de Menezes
Marta Rodrigues do Amaral
Maria de Lourdes Silva
Celso Luiz da Silveira
Alcione Pimenta
Adélia Jorge de Almeida
Gilson Rezende de Oliveira
Alexandrino Santos de Oliveira
Marta de Moraes
Shirley Castro Teixeira
Maria da Consolação Dias Batista
Zulma Cesar Pereira
Wellington Amâncio
Neusa Maluf Wutke
Denise Maluf Wutke
Áurea Maria Pimenta
Antônia Maria Mamede Negreto
Cleuza de Carvalho
Malba de Melo César
Cícero Teixeira Borges
Marcelino Tavares Mamede
Neusa Tavares Mamede
Maria Alcina Couto

Sandra Maria Cardoso Grillo
Terezinha Jesus Almeida
Roberto Silva
Neusa do Nascimento
José Eduardo Pousa Arcanjo

Campos Esperanto-Klubo, Campos, RJ:

Amaro Luiz Pereira da Silva
Elsa Gomes da Silva
Jarbas da Silveira Branco
Maria Augusta Duncan Martins
Maria Geni de Almeida
Agilda da Costa Macabu
Clarice Conceição Franco Carvalho
Cláudia Márcia Peixoto do Espírito Santo
Edgard Manhães de Andrade
Jair Duncan Navega Dias
Márcia Regina Peixoto do Espírito Santo
Maria Angélica Azeredo Lima
Maria Labouré Silva de Almeida Lima
Paulo Rogério Dias de Sá

Ribeirão Preto Esperanto-Klubo, Ribeirão Preto, SP:

Gilberto Mello Brigagão
Arthur Soldati
Leonardo Silva
Lêda Sílvia de Freitas Ramos
Divino Benedito dos Santos
Domingos Humberto Barillari
Marcelo Engrácia Garcia
Waldir Domingos Villela
Myrian Shisley de Souza Strambi
José Antônio Marin Netto
José de Freitas Ramos
Vardir Pires

Esperantista Societo de Porto Alegre, Porto Alegre:

José Augusto Costa Avancini

Esperanto - Rondeto, Bagé, RS:

Elaine Costa Deamici
Elenara Costa Deamici
Fernanda Moema Santos Souza
Ilo Corrêa
José Adir Cimirro
Maria Vieira Machado

Maria Nazareth Costa
Sílvio Luiz de Oliveira
Zaira Severo Leal

*Ĉe Colégio Santa Cruz,
Araguaina, GO:*

Irma Maria Pax
Maria da Glória Rodrigues da
Costa
David Araújo Filho
Maria do Carmo Bringel de
Oliveira
Neuridice Cardoso de Faria
Marivan Cardoso Dias
Maria Socorro Coelho Falcão
Alzira Dias Carneiro
Verônica Dias Carneiro

*Associação Brasiliense
de Esperanto, Brasília
DF:*

Marcus Rodrigues de Carvalho
José Rodrigues de Carvalho
Myrthilla Soares Guimarães
José Rocha Abreu
Ivete Cavalcanti Corrêa

Per korespondado:

José Benevides Cavalcante, Gar-
ça, SP
Heliane Cristina de Souza, Gar-
ça, SP
Dirceu Porciuncula, Rio Gran-
de, RS
Valderez Avelino de Souza,
Garça, SP
Paulo Domingos Mieres Caru-
so, Rio Grande, RS
Orame Avelino de Souza, Gar-
ça, SP
Norberto Cristófori, Jacareí, SP

Oráida Muniz, São João Nepo-
muceno, MG
Antônio dos Santos Costa, Pe-
dregulho, SP

José Expedito Castel, Goiânia,
GO

Esmeralda Sanches Castel,
Goiânia, GO

Maria Emília Barbone, Ribeir-
ão Preto, SP

Elisabeth Pacheco Suassuna,
Ribeirão Preto, SP

Maria Clara de Araújo Albu-
querque, Pirassununga, SP

Edna Brigagão, Ribeirão Preto,
SP

Sebastião Pompeu de Campos
Curado, Goiânia, GO

Maria José Normandia Pascoal,
Maceió

Thereza Alonço, São Paulo, SP
Álvaro de Melo Belda, São Mi-
guel Paulista, SP

Iracema Diocleciana Barbosa
Guimarães, Belém

José Pedro Miranda, Ribeirão
Preto, SP

Cyrol Barbosa Lima, Barra
Mansa, RJ

Nancy de Barros Barbosa Lima,
Barra Mansa, RJ

Therezinha Azzi, Barra Mansa,
RJ

Sueli Santos Moraes, Barra
Mansa, RJ

Jane Jorge Maluck, Barra
Mansa, RJ

Nileu Ribeiro Silva, Barra
Mansa, RJ

Manoel Ribeiro de Souza Filho,
Campos, RJ

Sebastião Cardoso, Cambará,
PR

Raul Tarzia, Bauru, SP

Dirce Alfaya Soutelinho, Ribeir-
ão Preto, SP

**NORMA SUPERA
DIPLOMO**

*Brazila Klubo "Espe-
ranto", Rio de Janeiro:*

Marcelina de Azevedo Carneiro
Suely David Caldeira

*Ĉe Universidade do
Ceará pere de Ceará Es-
peranto-Asocio, Fortale-
za:*

Maria Celeste Bastos de Miran-
da
Gualter Gonçalves Lopes
Sebastião Medeiros

Per korespondado:

Epitácio Torres, Pôrto Alegre
Maria da Glória Martins, Cam-
pos, RJ

Alice Aparecida Mendes de
Carvalho, Bauru, SP

Jaçanã Altair Pereira Guerri-
ni, Piracicaba, SP

Ruth Guimarães, Taubaté, SP

**NORMA PROFESSORA
DIPLOMO**

*Ĉe Universidade do Cea-
rá pere de Ceará Esperan-
to-Asocio, Fortaleza:*

Carlos Lima Melo
Cesar Oliveira de Barros Leal
José Dutra Mendes
Francisco Barbosa Filho
Roberto Passos Nogueira

Recenzo

EL JAPANA LITERATURO. Re-
daktita de Miyamoto Masao kaj
Isiguro Teruhiko. 226 p. 15 x 21
cm. 1 vol. tole bindita. Eldono de
Japana Esperanto — Instituto.
Tokio 1965.

La unua parto de tiu ĉi bonega libro
estas historio de la japana literaturo de
tri la lastaj jarcentoj kun pli detala in-

formado pri la nuntempaj verkistoj. Tiu
historio finiĝas per longa listo de verkoj
japanaj jam tradukitaj en Esperanton.
Kelkaj el tiuj libroj estas tre estimataj
en Esperantujo.

Poste venas 19 rakontoj kaj 2 teatra-
joj.

Kelkaj rakontoj ŝajnas al mi tre ba-
nalaj, sed eble ili estas alegorioj, kies
kaŝitan senceon mi ne scipovis kapti.
Ambaŭ teatraĵoj estas banalaj laŭ mia
juĝo. Ĉiuj rakontoj estis verkitaj en la
komenco de nia centjaro.

Plej interesaj instruoj venas en la fino
de la volumo: "Prononco de Japanaj

Vortoj" instruas nin kiel legi multajn vortojn el la japana lingvo. "Tabelo de Japanaj Mezurunuoj" prezentas al ni ĉiujn japanajn mezurunuojn de longo kaj distanco, areo, volumeno, pezo.

Tre detala "Glosaro" difinas multajn vortojn neoficialajn aŭ japanajn. Post la "Glosaro" venas la plej interesaj "komentoj". La japana antikva kalendaro uzis nomojn de birdoj kaj bestoj por mezurunuoj de la tempo; ekzemple: horduo de tigro (de la 3-a ĝis la 5-a matene); horduoj de ŝafo (de la 1-a ĝis la 3-a posttagmeze) ktp. Pri jaroj oni uzis la nomojn de rato, bovo, tigro, leporo, drako k.a. laŭ la Zodiako, kies signoj havis tiujn nomojn, sed ili estis nur dek (ne 12 kiel ĉe ni).

Entute libro plej interesa por instrui nin pri la japana kulturo.

Infanoj ne konas limojn. — Foto-libro verkita de Sam Waagenaar — 111 fotoj; 32 paĝoj da teksto de

diversaj aŭtoroj pri infanoj. Formato 11 X 17 cm. Eldono de A. W. Burma & Zoon — Utrecht — Nederlando. Distribuado de U.E.A.

Infanoj de ĉiuj koloroj, landoj kaj rasoj, ĝi estas unu el la plej interesaj libroj ĝis nun eldonitaj en Esperanto.

Laŭ antaŭparolo de Ivo Lapenna, ĉi tiu libro iel eniras en la serion Oriento kaj Okcidento pro la universaleco de la temo.

La unua parto de la libro konsistas el belaj artikoloj, verkitaj de diverslandaj Aŭtoroj pri infanoj: ĉiuj artikoloj estas tre altnivelaj.

La dua parto estas cento da fotoj de infanoj en ĉiuj mondpartoj.

La ĉarmo de la infanoj estas universala kaj altiras ĉiujn korojn.

La tuta libro estas tre leginda kaj plej rigardinda.

I.G.B.

LAŬGRUPA MEMBRO — STATISTIKO 1967

GRUPO	AM	MJ	MA	MS	DM	HM	JMJ	JMA	KUNE
Ceará E.A.	1	3	3	—	—	—	1	—	8
A. Pernambucana E.	6	—	4	—	1	—	—	—	11
A. Baiana E.	—	—	3	—	—	—	—	—	3
S. Mineira E.	38	2	9	2	4	—	—	—	55
C.E. Juiz de Fora	—	—	3	1	—	—	—	—	4
Santos Dumont E.-K.	—	—	4	—	—	—	—	—	4
São Lourenço E.G.	9	—	2	—	—	—	—	—	11
A. Capixaba E.	6	—	2	—	—	—	—	—	8
Niterói E.-K.	4	—	1	—	1	—	—	—	6
Campos E.-K.	6	—	8	—	—	—	—	—	14
Resende E. K.	8	—	1	—	—	—	—	—	9
Volta Redonda E.-K.	1	—	2	1	—	—	—	—	4
Brazila Klubo "Esperanto"	35	6	29	6	9	1	—	3	89
A. Paulista E.	4	1	5	—	3	—	—	—	13
Ribeirão Preto E.-K.	3	1	2	—	—	—	—	—	6
CE Santos	7	—	2	—	1	—	—	—	10
V. Stelo ES, S. J. Campos	1	—	3	—	—	—	—	—	4
EK Zamenhof, S. Mig. Paulista	—	—	4	—	—	—	—	—	4
Paraná E.A.	2	—	4	—	—	—	—	—	6
ES Porto Alegre	6	1	2	—	2	—	—	—	11
E. Rondeto, Bajé	3	2	1	—	—	—	—	—	6
ES São Leopoldo	8	—	—	1	—	—	—	—	9
Goiânia E.-K.	2	—	4	—	—	—	—	—	6
A. Brasiliense E.	—	—	3	4	1	—	—	—	8
24 grupoj	150	16	101	15	22	1	1	3	309

En 1967 estis enskribitaj en la Movado 606 brazilaj membroj el kiuj 297 izolaj.